

# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono : 20F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon  
CCP 956-28 P Montpellier

2a Kvaronjaro 1986

n° 97



## UN CENTENAIRE QUI SE PORTE BIEN !

"La tribune Vauverdoise"  
Avril 1986

### Congrès National

« Les participants au congrès de l'Union française pour l'espéranto, réunis à Gérardmer, du 18 au 21 mai 1986,

– estiment qu'une bonne compréhension entre les peuples demeure l'un des garants d'une paix stable ;

– considèrent que, depuis 100 ans, l'espéranto s'est affirmé être l'instrument d'une libre communication entre peuples de différentes nationalités et cultures ;

– remercient la conférence générale de l'U.N.E.S.C.O. pour sa résolution de novembre 1985, par laquelle elle reconnaît la parfaite adaptation de l'espéranto à suivre l'évolution de la civilisation et invite les Etats membres des organisations internationales non gouvernementales à participer à la célébration du centenaire de cette langue internationale ;

– souhaite qu'en France les associations, les communautés, les organisations politiques, les pouvoirs publics, les décideurs, les enseignants examinent, sans parti pris et en toute objectivité, les possibilités qu'offre une langue neutre et précise, comme l'espéranto pour les échanges internationaux de tous niveaux et en toutes matières ».

Quel rapport avec Vauvert ? Tout simplement que dans notre ville se déroulera le Congrès régional d'Espéranto et que les espérantistes vous invitent, à cette occasion à venir découvrir les possibilités de la LI, lors d'une exposition au Centre Gourdon et de différentes conférences. L'expo sera visible à partir de 15 h, le samedi 26 avril.

A 15 h 45, M. Laval, de Nîmes, auteur de plusieurs livres dans la LI, parlera en espéranto de la littérature dans cette langue (plus de 30.000 titres, dans toutes les catégories littéraires).

A 18 h 30, M. Pierre Janton, professeur d'anglais et d'espéranto à la Faculté de Clermont-Ferrand, auteur d'un livre sur l'espéranto (N° 1.511 - "Que sais-je ?" - P.U.F.) fera une conférence en français sur le thème :

– "De l'anglais à l'espéranto : problèmes des langues internationales", et répondra aux questions du public (entrée gratuite).

A signaler que parmi les autres universités donnant un enseignement en espéranto, il y a Aix. Le samedi soir, une soirée culturelle présentera des films et pièces de théâtre dans la LI. Les personnes intéressées sont cordialement invitées.

Il est possible d'apprendre l'espéranto seul ou par correspondance. Dans les environs de Vauvert, des espérantistes sont prêts à vous aider. Nîmes compte un Centre culturel espérantiste qui donne des cours gratuits. Voici son adresse :

– 213, avenue de Camargue - 30230 Caissargues.

"*Esperanto, la lingvo de internacia amikeco atendas vin*" - "L'espéranto, la langue de l'amitié internationale vous attend".

Il ne s'agit pas d'un adepte des théories de Rika Zarai ou similaire, mais d'une langue inventée en 1887 par le Docteur Zamenhof, en Pologne. Quand a paru sa première brochure d'une trentaine de pages, il l'a signée du pseudonyme "Doktoro Esperanto" (le docteur qui espère) et le nom est resté pour désigner cette langue internationale (LI).

Dans les instances internationales, aucune langue ne s'impose vraiment (à Bruxelles, au lieu de 7 langues officielles, qui mobilisent des équipes de 42 traducteurs, il y a maintenant 9 langues officielles et des équipes de 72 traducteurs. Babel pas morte... On devine le gaspillage de temps et d'argent.

### VUES SUR L'AVENIR ( article remis à la presse après notre congrès fédéral)

Le congrès de la fédération du Languedoc-Roussillon pour l'Espéranto s'est déroulé ce dernier week-end à Vauvert, en présence des délégués des différents groupes de la région et dans une ambiance internationale comme il convient pour une telle rencontre puisqu'il y avait des personnes originaires de Belgique, Espagne, Italie mais aussi Hongrie, Japon ou Sénégal. Une palette variée pour qui le problème de la langue est résolu depuis belle lurette.

Les programmes les plus suivis furent les conférences du Professeur Janton, enseignant d'anglais et d'espéranto à l'Université de Clermont-Ferrand, la première en français sur les problèmes des langues internationales, la seconde en espéranto sur le projet DLT, actuellement expérimenté par une firme hollandaise, où l'espéranto adapté aux ordinateurs pourrait servir de "langue-pont" pour une traduction semi-automatique avant la fin du siècle alors que les travaux pour la traduction automatique d'une langue nationale à une autre ne risquent d'aboutir que bien au-delà de cette fin de siècle.

L'Espéranto aura cent ans en 1987 et mise sur l'avenir. Les espérantistes vous donnent rendez-vous à l'an 2000 mais aussi dès cette année, pour leur congrès universel de Pékin (ou en 87 en Pologne pour le Jubilé)...ou à bientôt pour une initiation à cet outil de communication, utilisable dans une certaine de pays. Renseignements au 66 32 86 36.

\*\*\*\*\*

PROKOKOLO DE NIA JARKONGRESO EN VAUVERT (la 26-an kaj 27-an de Aprilo).

Tutunue ni devas direkti plej varmajn dankojn al Jean HENIN (J.H.) kaj Lucette NEGRON (L.N.), kiuj sukcesis aranĝi tre konvenan federacian kongreson malgraŭ ne ĉiam facile imageblaj malfacilaĵoj kaj kostaj kon-  
-diĉoj sen paroli pri eternaj apatioj kaj individuismoj en niaj propraj vicoj. Ĉu ne Humphrey Tonkin, tiam prezidanto de U.E.A., iam diris :  
"Esperanto progresas spite la esperantistojn !" ? Varmajn dankojn ankaŭ al tiuj, kiuj, ne nur per simpla ĉeesto, kontribuis per programeroj, inter-  
-venoj kaj aranĝoj.

Tre allogaj estis la salono ĉe "Centre Gourdon" en Vauvert kaj la loĝejaj kaj manĝokondiĉoj ĉe "La Manadière" en Le Cailar.

Sabaton, la programita prelego de Profesoro JANTON, en la franca lingvo, altiris sufiĉe multnombrian aŭskultantaron. Malgraŭ la fakto, ke, pro bombomnaco feliĉe sen plia konsekvenco ol unuhora prokrasto de la trajno, kiu veturigis Prof. JANTON de Clermont-Ferrand al Nîmes, ĝisfine ĉeestis la helpurbestro de Vauvert cetere interesita de ekspoziciitaj libroj, dokumentoj kaj donitaj informoj pri Esperanto.

Diskreta sed ĝojiga estis la ĉeesto de S-ro SAINT-ROME el Montpellier, respondeculo de poreŭropa asocio kaj ties ligilo "le relais de l'Union" por kiu la eŭropa lingva problemo ne estas fremda. Ni notis ankaŭ la ĉeeston de S-ro LAVAL (nia bone konata kaj aprecata VALO), S-ino VOLPE-LIERE, Ges-roj BLARY, nia samideano Claude CAYZAC, kunlaboranto de S-ro SAINT-ROME por prilingvaj demandoj, k.a., dum nia agema LENTAIGNE ne preterlasis la okazon por doni al juna freŝbakita senegalia esperantistino la lastajn pruvojn, kiuj mankis al ŝi por konscii pri la nepra utilo kaj neceso de Esperanto.

Kion diri pri la prelego de Prof. JANTON ? Revenis al mia memoro la vortoj de Raymond POINCARÉ : " Le bon sens a toutes chances d'être entendu, s'il peut obtenir qu'on l'écoute " !

Ni fieras, ke inter ni troviĝas tia homo kia Prof. JANTON, kies valorega kontribuo al nia ideo nur egalas la virtojn de homo, kiu scias resti simpla, gvida, entuziasma kaj klarvida vid-al-vide la progresojn de Esperanto.

— Ankaŭ en la bonega paroladeto de nia amiko VALO, titolita "Esperanto kaj Literaturo", ni povis ĉerpi pozitivajn faktojn pri la matureco de nia lingvo. Inter la du enhance brilaj prelegoj de VALO kaj de JANTON situis la unua parto de la programita ĝenerala kunveno.

Venis 10 el la 15 federaciaj estraranoj kaj komitatanoj. Kelkaj petis senkulpigon kaj bondeziris i.a. nia kara amiko DELIGNE el Narbonne.

Kun dumtempaj franclingvaj resumoj J.H. salutis, retroiris al faritaĵoj kaj kuraĝigis ĉies iniciatojn al farotaĵoj.

S-ino AUTHIER (S.A.) raportetas pri la sukceso de printempa lingvo-  
staĝo prizorgata de la grupo de Béziers : 19 enskribitoj pasintjare, jam 25 ĉi-jare. D-ino VIERNE (Y.V.) konfirmas, ke ĉi-jare la kutima aŭtuna semajno prizorgata de la grupo de Montpellier okazos ne en Sète sed ĉe Alpoj de la 30. VIII ĝis la 6. IX. Sukceso daŭras.

La federacia financa situacio prezentita de L.N. estas bona precipe dank'al abonoj por "Sudfrancia Stelo" (S.F.S.). Nia federacia kasistino proponas -kaj estas akceptite- ke la ĉiujara bilanco estu ne laŭ la lerneja jaro sed laŭ la ordinara jaro (januaro/decembro).

J.H. meritas laŭdojn pro la nun tre bona S.F.S. malgraŭ renkontitaj malfacilaĵoj kaj neoftaj aŭ ne ĝustatempaj kontribuoj.

La federacia libroservo ankaŭ tre zorge mastrumata de J.H. helpe de liaj du filinoj por la disvendoj dum niaj renkontoj (ni memoru ke ankaŭ Izabela penas kunligi la federaciajn gejunulojn) estas tre kontentiga fako. La profito estas ege malalta sed la ĉefa avantaĝo estas, ke ni pro-  
-praokule disponas pri plej diversa aro da materialo : libroj, kartoj, faldfolioj, kasedoj, k.t.p.

J.H. parolas pri asociaj karavanoj al la Pekina universala kongreso, kaj substrekas, ke iu S-ino CHARPENTIER el Parizo faris proponojn finance tre interesajn.

Post la komuna sabata vespermanĝo ni ĝuis agrablajn teatraĵojn de niaj senlaciaj geamikoj el Béziers kaj tre agrablajn diapozitivajn de S-ro DIEZ pri Turkio.

Dimanĉon matene ni havis duan ĝeneralan kunvenon. Estis IO el la federaciaj estraranoj kaj komitatanoj, tamen ne ĉiuj la samaj kiel sabaton. J.H. legis salutleteron de Claude NOURMONT ĝenerala sekretario de U.F.E.

Alpaŝe al la unua jubilea jarcento de Esperanto estus bone, ke la grupoj propagandu partoprenante al la tiel nomataj "Forumo de Asocioj". Prefere estas uzi okulfrapan materialon: afiŝojn, panelojn, grafikaĵojn kaj zorge selektitajn librojn. La problemoj estas, ke en Béziers, Montpel-lier kaj Nîmes tiaj eventoj estas aranĝataj de la "Jeune Chambre Economique" kaj sekve, pro tro altaj aliĝkostoj aŭ postuloj ne eblas al niaj grupoj elspezi tiom da mono. En Perpignan tia "forumo" ne ekzistas. Lucien ANGEVIN pledas pri utilo de publikigo de adresaro, laŭ departemento, de konataj esperantistoj aŭ de esperanto-informantoj. Restas grava demando pri -se ne utilo almenaŭ rajto- la diskonigo de adresoj. La homoj -ekzemple la abonantoj de S.F.S.- klare diru per simpla "jes" aŭ "ne" ĉu ilia nomo kaj adreso povus aperi en adresaro, kiu enlistigus esperanto-informantojn en la koncerna departemento. L.N. surloke jam bonvolis kolekti nomojn de konsentintoj.

Y.V. lasis al J.H. du skribajn demandojn kadre de la 100 jaroj de Esperanto

1°) -ĉu U.F.E. planas eldoni afiŝon, kies modelon kaj vendkondiĉojn ĝi povus enŝovi en "Franca Esperantisto"-n?

La demando estas resendata al la nacia kongreso de U.F.E. en Gérardmer pere de nia federacia reprezentanto.

2°) -ĉu por la jarlibro de U.E.A. eblus kolekti reklamojn de hoteloj, kie regule kunvenus esperantistoj?

Respondo: ideo ne tute nova! La vojaĝemuloj kontaktu la surlokajn esperantistojn.

#### Oficialaj decidoj:

-Kongreso de U.F.E.: Charles GERARD estos nia reprezentanto

-Federacia komitato: S-ro PELLETIER ne rekandidatiĝis.

Rekandidatiĝis kaj estis reelektitaj: Suzanne AUTHIER, Fernande TERRAL, Lucien ANGEVIN, Jean AMOUROUX.

-Aŭtuna Federacia Laborkunsido: ĝi okazos en Sète, ĉe Lazaret, la 14-an de septembro 1986.

➡ -Federacia kongreso 1987: S-ro LLECH-WALTER konsentas plani la kongreson, principe la 10-an de majo 1987, ligo kun "Kataluna Esperanto-Asocio".

La dua parto de la dimanĉa mateno konsistis el nova prelego de Profesoro JANTON: "Esperanto kiel ponto-lingvo en la tradukprojekto Distribuita Lingva Tradukado (D.L.T.) de la nederlanda firmao B.S.O".

En tre klara kaj flua Esperanto, P.JANTON eksplikis al ni la rolon, kiun havas nia lingvo por la ellaborado de tiu permaŝina traduksistema lingvaĵo. Ne plu temas pri la lingvo, kiun ni kutimas paroli, legi kaj skribi, sed ĝi estas la bazo (aŭ la ponto) por tute perspektiva lingva tekniko. Nur la estonto diros al ni ĉu Esperanto fine venkos de tiu lingva batalo. Estus belega omaĝo je la komenco de la dua jarcento de la mirinda propra ellaboro de Doktoro ZAMENHOF.

Post la lasta komuna manĝo en Le Cailar, kiu volis ekskurse viziti la historie riĉan urbon Aigues-Mortes. Ankaŭ ĝi meritis viziton.

Jean AMOUROUX

## VIVO DE LA GRUPOJ

**BEZIERS** : *La grupo prizorgis la organizadon de la staĝo de Cassan*  
 \*\*\*\*\*  
*Tiu staĝo estis ĉonsukcesa kaj certe okazos en 87 en la sama loko. Pluraj staĝanoj el transmaraj departementoj faris demandojn pri la internacia lingvo; ankaŭ pluraj grupoj, kiuj vizitis la kastelon (ĝi estas historia monumento) rimarkis nian staĝon. Jen raporto pri tiu staĝo:*

Enskribiĝis 26 personoj. La staĝanoj plejparte loĝas en la regiono : Nîmes, Agde, Perpignan, Millau, La Canourgue, Béziers kaj najbaraj vilaĝoj. Tamen kelkaj konsentis vojaĝi pli longe : de Albi, Aix, Montélimar. Tri personoj ne povis veni pro malsano (Montélimar, Maraussan). Kompense partoprenis unu plia, kiu ne povis sin anonci pli frue, kaj 4 junulinoj aldoniĝis kaj loĝis en la kampadejo. Do regule 28 homoj partoprenis la staĝon. Krome, juna virino venis speciale la lastan tagon por trapasi la duagradan ekzamenon. Ŝia laboro ne ebligis la tutan restadon. Dimanĉe okazis la ekzamenoj : 4 kandidatoj-kuraĝuloj de diversaj aĝoj (de 11 ĝis pli ol 70 jaroj) por la unuagrada kaj 3 por la duagrada.

la vespero, ĵaŭdon: praktikaj informoj kaj prezento de la staĝanoj pere de demandoj  
 2a vespero, vendredon: prelegetoj pri sciencaj temoj : a) drivado de kontinentoj kun lumbildoj (Sro Biré) b) kial la okupantoj de artsatelito (aŭ spackajuto) ŝajnas ne plu pezi.

3a vespero, sabato: teatro : diversaj skeĉoj prezentitaj de la staĝanoj. La gejunuloj rimarkinde klopodis por studi tekstojn en mallonga tempo, kaj estis tre kontentaj sukcese. Espereble en la venonta staĝo, pluraj volos fari same aŭ, kial ne, jam prepari iun skeĉon antaŭ ol esti en Cassan.

Rimarkoj de la organizintoj: Post la staĝo la grupo de Béziers diris : "Uf", ĉar ĝis la lasta tago, ni ne estis certaj, ke la afero bone disvolviĝos. Tamen, finfine, ĉio okazis sufiĉe glate, kaj ŝajnas, ke la staĝanoj estis kontentaj.

La domo plaĉis, kaj ni disponis pri taŭgaj klasĉambroj. Do, ni intencas denove peti akcepton en Cassan estontece. La plej tikla demando estas : "ĉu ni havos kursgvidantojn por 4 kursoj?". Tion dezirus la staĝanoj. Do, jam de nun, ni alvokas tiujn, kiuj povus "oferi" 4 tagojn al gvidado de kurso aŭ de konversacirondo. Same por la vesperoj, estus necese, ke kelkaj el vi sin proponu (ludo, skeĉo, fotoj, ktp...). Certe estas kaŝitaj talentoj en la Federacio. Pli ĝenerale, ni estus dankemaj al ĉiuj (staĝanoj aŭ ne), kiuj povus fari sugestojn por plibonigi la restadon. Zorge ni studos ilin, kaj kalkulos kun ili, kiom nur eble. Estos profito por la venontaj staĝanoj.


Ni deziras al vi bonajn somerajn feriojn. Dum tiu tempo, cerbumu, cerbumu kaj sendu al ni la rezulton de via meditado. Ni kore dankas vin.

\*\*\*\*\*

**MONTPELLIER** : *Tajperaro : en nia lasta bulteno, ni indikis, ke nova lernantino de la kurso de S-ro Céliqua estas studentino en Senegalio. Kompreneble temis pri studentino el Senegalio... kiu tamen baldaŭ estos denove en Senegalio.*



La lastaj kunvenoj okazis la 5an de Marto (lumbildoj pri Gvajano), la 7an de Majo (diskutoj kaj ludoj) kaj la 4an de Junio, ĉiam la unuan merkredon de la monato en "Maison pour Tous Joseph Ricôme", Rue Pagès.

La finjara renkontiĝo okazos la 2an de Junio ĉe Ges. Diez, ekde la 5a posttagmeze.   
 Tiuj, kiuj deziras renkonti esperantistajn amikojn, estos bonvenaj.

\*\*\*\*\*

Kiel indikas la apuda bildo, la kutima septembra semajno NE OKAZOS en Sète sed en la ALPOJ, en Habère-Poche, de la 30a de Aŭgusto ĝis la 6a ~~de~~ <sup>de</sup> Septembro

Respondekas : Centre Culturel Esperanto  
 5, Rue du Docteur Roux 34000 Montpellier

La "semajno" okazos en la feriejo "la joie de vivre" alt. 1000m en verda valo, ĉirkaŭita de belegaj alpaĵ montoj. (unu-kaj du-personaj ĉambroj; moderaj prezoj).

\*\*\*\*\*

**LA CANOURGUE:** Delegacio de tiu vilaĝo vizitis germanan vilaĝon, Gaiberg, komence de Majo, kun la celo de eventuala ĝemeliĝo. Ĉar Gaiberg troviĝas nur je 10 km de Heidelberg, ĝemelurbo de Montpellier, J. Hénin, kiu gvidis la delegacion, kaptis la okazon por renkonti plurajn esperantistojn de Heidelberg. La respondeculo de la delegacio de Gaiberg, kiu ĉeestis tiun renkonton, kaj parolas nur kelkajn vortojn en la franca lingvo, konfesis ke "estas mirige, kiel la esperantistoj komuniĝas facile, tiel facile kiel la Germanoj inter si... La lingvo sonas speciale sed agrable...". En Gaiberg troviĝas komencantino de esperanto, espereble ŝi perfektigos kaj konvinkos aliajn, ke estas pli facile lerni esperanton... ol la francan. Okaze de tiu vizito estis decidite interŝanĝi la bultenon de nia federacio kun tiu de Baden-Württemberg. Baden-Württemberg estas la suda parto de Germanio kun urboj kiel Heidelberg kaj Heilbronn, respektive ĝemelurboj de Montpellier kaj Béziers. Ĉu aliaj urboj de nia federacio estas ĝemeligitaj kun urboj en Baden-Württemberg?

*Ni multe diskutis en Vauvert pri la aperigo de adresoj en nia bulteno. Guste en la lasta numero de la bulteno de Baden-Württemberg aperas karto de la lokoj en tiu regiono, kie ekzistas esperantistoj. Sekvas la listo de la respondeculoj kun adreso kaj telefon-numero, kurvenloko aŭ, kiam ne ekzistas grupo, la nomo kaj adreso de esperantisto surloka. Imitinda ekzemplo?*

\* \* \* \* \*

**NIMES** : Grupo da 50 Nimanoj vizitis Bulgarion en Aprilo; inter ili estis 5 esperantistoj, kiuj organizis grupeton por instrui esperanton : 5 homoj venis. Kelkaj renkontiĝos denove en Sète en Septembro.

*Interesa iniciato, al kiu ni deziras bonan sukceson. Certe, kiam la homoj alfrontas lingvajn problemojn, ili estas pli atentemaj.*

\* \* \* \* \*

Generala kunveno de la grupo okazis la 26an de Majo. La estraro restas sama sed la grupo estos sendependa de la federacio.

*Ĉiu grupo estas aŭtonoma; se ne ekzistas kunlaborado inter la grupoj kaj esperantistoj de la regiono ne utilas federacio. La esperantistoj estas malmultaj, disaj, ktp. Kiel ni progresigos nian komunan aferon, se ĉiu grupo volas esti sendependa? Ni esperas plu aperigi raportojn pri niaj gesamideanoj en Nîmes.*

\* \* \* \* \*

**PERPIGNAN** : Pluraj geesperantistoj, precipe gejunuloj, partoprenis la staĝon de Cassan kaj regule sekvis la kursojn (Mylène kaj Candide Charlet, Ramos Anson, Charles Gérard). La tri unuaj provis la ateston pri lernado. Ĉiuj gratulas S-inon Authier kaj la anojn de la grupo de Béziers pro la bona organizado de la staĝo. Espereble venos kelkaj pliaj gejunuloj al la staĝo de 87.

\* \* \* \* \*

*Grupestroj, kursestroj, jam pripensu la eblecon partoprenigi gejunulojn al tiu renkonto! Nur per interkonatiĝo, la gejunuloj emos esperantistiĝi.*

\* \* \* \* \*

La 8an de Junio okazis renkontiĝo kun la gesamideanoj de la "Girona Espero" ĉe la "Omnium Cultural" de Girona. Post komuna tagmanĝo ni vizitis la vilaĝon Besalù. Agrabla etoso. Ni diskutis pri nia venonta federacia kongreso en aŭ apud Collioure.

**\* LA KUTIMA AŬGUSTA PIKNIKO OKAZOS LA 24AN DE AŬGUSTO EN ARGELES ĈE LA VILAO DE R. LLECH WALTER, 38 BOULEVARD DE LA MER. ĈIUJ ESTOS BONVENAJ !**

\* \* \* \* \*

Tutescepte ni jam konas la datojn de diversaj aranĝoj, bonvolu noti kaj...

. . . partopreni

- je la 14a de Septembro 1986 : Federacia Laborkunsido en Sète
- je la 9a kaj 10a de Majo 87 : Federacia Kongreso en Collioure
- de la 28a ĝis la 31a de Majo : Federacia staĝo en Cassan
- de la 5a ĝis la 9a de Junio : Nacia kongreso apud Fréjus



**JAM NOTU!**

# Leteroj

*S-ro Colney, B.P. 126, 05004 Gap Cedex skribis al SFS pri adresaroj. Li ilustris siajn argumentojn per du anekdotoj, jen ili :*

Antaŭ kelkaj semajnoj grupanino en Gap flugis al insulo Malto kun karavano por emeritoj, por tie pasigi kelkajn tagojn.

Reveninte ŝi kontaktis la grupon kaj grandtrajte raportis pri sia vojaĝo.

Al la demando : "kiel vi rilatis kun la insulanoj?", ŝi respondis, ke pli malpli bone ŝi provis balbuti kelkajn vortojn en la angla.

Evidente ni prezentis al ŝi la demandon : "ĉu vi provis rilatojn kun la tieaj esperantistoj ?". -Ve, respondis ŝi, vere mi ne sciis, ke estas esperantistoj en tiu insuleto.

Kun grandaj okuloj, mirege, ŝi konfesis : "mi ne povis supozi, ke ankaŭ en Malto ekzistas esperantistoj". Plorinda neglekto, evidenta manko de informado.

En la lasta numero de "Sudfrancia Stelo" mi legas pri vojaĝo en malproksima insulo Sri-Lanko de alia samideanino. Pli sagace ol nia Gapanino, ŝi informiĝis pri eventuala esto de esperantistoj en tiu lando. Sed kiom da klopodoj ŝi devis fari por ricevi tiun informon. Peti de aktivulo la adreson de Svisa esperantisto, kiu mem, feliĉe, povis doni adreson. Vere la esperantistoj revas aŭ malfruas unu jarcenton.

Dum la anglolingvaj scipovuloj scias, ke en ĉiuj flughavenoj, multaj turism-oficejoj, vojaĝagentejoj, eĉ hoteloj, ili trovos iun, kiu parolas aŭ parolaĉas la anglan, la esperantistoj kiel "Fratino Anna" atendas renkonti verdstelulon sur la strato. Foje tio okazas, foje iuj atendadas... la tutan vivon kaj tiam, ĉu ili forgesis Esperanton aŭ ĉu -pli ofte- laciĝis, atendante tiel vane.

Urĝas adresaro !

*Temas kompreneble pri tutmonda adresaro. Ĝis kelkajn el ni, konstatiti dum la kongreso de Vauvert, ke iuj esperantistoj -eĉ sufiĉe multaj - rifuzis menciion de siaj nomoj kaj adresoj en adresaro aŭ simple listo de abonantoj de SFS. Kun la lasta numero de la jaro 1986 ni sendos al ĉiu abonanto demandaron pri la bulteno kaj la eventuala aperigo de adreso en la bulteno. Kompreneble ni aperigos la adresojn de nur tiuj, kiuj estos permesintaj tion. Se esperantistoj sin "kaŝas", kiel la ekstera publiko povus scii pri Esperanto?*

\*\*\*\*\*

*Alvenis letero de CERL (Centre Espéranto de la Région Lyonnaise); ĝi meritas vian atenton:*

Nia asocio jam informis vin pri la revueto "EK", eldonita en Villefranche sur Saône, fare de pluraj mezlernejoj, speciale tiu de "Jean Moulin", kie funkcias esperanto-kurso dum la lerneja tempo.

Nun la dua numero estas eldonita kaj estas aĉetebla por subteni la funkciadon de la E-o kurso, disvastigi la Internacian Lingvon inter la diversaj mezlernejoj, ĉe la gepatroj kaj instrumedio.

Estus bone, se via federacia povus agi, ĉu ĉe la diversaj kluboj, ĉu ĉe Gee-anoj, ĉu ĉe mezlernejoj prezentante la revueton. Aĉetante kelkajn ekzemplerojn, vi havos okazon paroli pri la Internacia Lingvo. Nepre necesas scii, ĉu la tria numero povos eldoniĝi.

Ni esperas, ke vi komprenas la situacion de niaj subtenoj al la revueto kaj tiu esperanto-kurso.

Rilatu rekte kun: Ademsco (aŭ S-ro Miquel -Principal du Collège J.Moulin)  
52, Rue J-M. Savigny  
69400 Villefranche s/ Saône.

\*\*\*\*\*

"Tutmonde" -Pacifista movado - adreso: Apartat 313 Terrassa Hispanio ekzistas de 18 monatoj kaj serĉas "pacdelegitojn".

... "Nia celo : havi UNU pacdelegiton en ĉiu lando, kaj UNU pacdelegiton en ĉiu urbo kaj en ĉiu strato. Ĉu utopio? Eble, sed... ju pli da pacdelegitoj, des malpli da militdangero. Forigi la perforton de la mondo estas idealismo, sed ne tute nerealegebla. Tio ne estas fantazio! Ni vekigu ! Ni helpu la homaron por eltrovi la vojon al la bona kunvivado. Antaŭen!". Por ricevi senkoste la cirkulerojn de "Tutmonde", skribu al la ĉi-supra adreso.

\*\*\*

## DIVERSAĴOJ

De S-ro Jean GAUTHIER, respondeculo de "Loisirs Educatifs", 11 Rue P. Langevin 13200 ARLES, ni ricevis proponon, speciale por tendumantoj kaj gejunuloj.

Li posedas terenon en Cevenoj, je 30km de Alès, 70 de Nîmes, 100 de Montpellier, 25 de Villefort kaj 20 de Monto Lozère.

Tie li volonte akceptus esperantistojn por semajnfinoj kaj intencas organizi foto- kaj esperanto-staĝojn. Tiuj staĝoj daŭrus unu semajnon kaj okazus inter la 20a de Julio kaj la 20a de Aŭgusto.

Tiamaniere la foto-amantoj kaj la esperanto-parolantoj povus konatiĝi en feria kadro.

S-ro Gauthier fondis en 1980 "IKAF" (Internacia Kruciĝo de Amatoraj Fotografistoj). Jen detaloj pri tiu asocio:

"Tiu asocio estis kreita en 1980. Ĝi devus permesi al diversaj asociaj aŭ individuaj fotografistoj partopreni kunvenojn, prefere en la naturo.

Tiel la kunvenantoj povos plibonigi siajn konojn pri fotografado.

Tia estas la kialo de la antaŭvido de kunkuna konstruado de foto-laboratorio en tereno ĉe Cevenoj, kie ni jam kreis tielnomatan "Internacia Kampo por Libertempo".

Tio certe ne estas luksa komforta loko: oni devas kampadi kaj dormi subtende.


"IKAF" devas permesi ferii malmultekoste kaj samtempe lerni fotografion kaj la internacian lingvon. Tiu asocio devas helpi al propagando favora al Esperanto en junula medio, sed la partoprenantoj estos ĉiuaĝaj junuloj. Nur la spirito gravas. La kondiĉo: konsenti pri senkomforta kampado.

IKAF ankaŭ ebligas partopreni ĉiujare en Arlezo la internaciajn foto-kunvenojn, kiuj okazas dum la monato Julio.

Ni esperas, ke ĉiuj samideanoj bonvole partoprenos tiujn kunvenojn, kaj sendos al ni siajn ideojn pri tiu afero.

Tiuj kunvenoj povus okazi dum kelkaj semajnfinoj en bela printempa vetero kaj dum dektaga renkonto en somero".

Restas la problemo por trovi gejunulojn kaj interesatojn. Ankaŭ en nia stagejo Cassan troviĝas foto-laboratorio. Ĉu kunveni tie inter "fotografantoj" en 1987 por pli detale diskuti la proponon de S-ro Gauthier? Se vi volas kontakti lin rekte, jen lia telefon-numero: 90-96-42-25.




\*1986 estas la Internacia Jaro pri PACO.

Pro tio la Bahaa grupo de Nîmes serĉas poemojn pri Paco en la Internacia Lingvo.

La Bahaanoj agnoskas Esperanton kiel internacian lingvon.

Al pripacaj poemoj ili aldonus ariojn kaj registrus la komponaĵojn en sia bone ekipata registrejo. Kiu helpos, sendante poemon al "Sudfrancia Stelo"?

Ne pre indiki la aŭtoron de la poemo.



## Nia Tamtamo

Informbulteno de la zaira Esperanto-movado  
marto - aprilo 1986.

n° 2/86

Kiel indikate, "Nia Tamtamo" estas informbulteno de la Zaira E<sup>o</sup>-movado (aliĝinta al UEA en 1966). Prizorgas tiun bultenon nia federaciiano K. Braet kiun ni gratulas.

Vi povas finance subteni la movadon en Zairio, eĉ per malgrandaj donacoj, ĉu rekte al S-ro Braet, 1 Rue des Palmiers 66270 Le Soler, ĉu al UEA konto E IZK-L (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam Nederlando). "Nia Tamtamo" ankaŭ aperigas la nomojn, aĝojn kaj adresojn de Zairoj, kiuj deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj.

# 78-a Franca Kongreso de Esperanto

*kaj 79a!*

*S-roj Gérard kaj Testas ĉeestis la 78an Francan Kongreson en Gérardmer.  
Charles Gérard reprezentis nian federacion, jen lia raporto:*

En la orienta parto de Francio staras la urbeto Gérardmer inter Loreno kaj Alzaco. Tie okazis dum Pentekosto la 78a Nacia Kongreso de Esperanto. Dum la interkona vespero, mi retrovis mian instruiston, kiu la unua konatigis kaj instruis al mi esperanton en la unuagrada lernejo. Multaj gesamideanoj jam konatiĝis en la aliaj naciaj kongresoj. Malfermo de la kongreso kun S-ro Poncelet, malnova Ministro, Prezidanto de la Generala Konsilio de Vogejoj, la urbestro de Gérardmer kaj diversaj respondeculoj de la regiono. Prelego pri Vogejoj per lumbildoj kaj tipa muziko (spinet). Debato pri la kongrestemo: "Esperanto kiel rimedo, cele al komuna paco". S-ro Texier prelegis pri la "Jubilea Kampanjo". Dimanĉe: membrokunveno, prezento de la venontjara kongresloko kaj diversaj raporto. Distra vespero, kutimaj dancoj el Vogejoj kaj esperantaj humuraĵoj. Ekskursoj en la "Altaj Vogejoj" finis la kongreson. La etoso estis tre varma, la multaj ĉeestantoj (200) longe aplaudis la lokan kongresan komitaton pro la bona organizado.

Gis la venonta jaro en St. Raphaël !

\*\*\*\*\*

*Nia reprezentinto sendis prospekton pri la venonta nacia kongreso. Jen kelkaj informoj:*

"Por digne festi la jubileon de Esperanto, ni elektis kongresurbon en feria kadro: temas pri restadejo apud la maro, situanta 10 kilometrojn sudokcidente de St Raphaël, ĉirkaŭita de arbaraj montetoj.

En la sama loko, vi disponos pri kongresejo, loĝejo kaj restoracio sed ankaŭ pri tenisejo, naĝejo, pilkludejo, se ne paroli pri la maro trans la strato, aŭ eblaj promenadoj en la montoj. Ĉiu ĉambro estas dulita, kun duŝejo, fridujeto kaj kafmaŝino. Pluraj estas speciale atingeblaj per rulseĝoj.

Por tiuj, kiuj preferas tendumi, proksima kampadejo povas ilin akcepti kun ebleco mendi varmajn pladojn en la kuirejo aŭ aĉeti en magazeno mempreparotajn manĝaĵojn.

La loko estas tiom alloga, ke ni suspektas, ke eble vi ŝatos ferii tie antaŭ aŭ post la kongreso: ni aranĝis, ke por tiuj "ekstraj" tagoj, vi havos rabaton: taga restado kostos al vi 250 Fr.

Kiel atingi? En la stacidomo de St-Raphaël haltas ĉiuj vagonaroj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj (linio: Marseille-Vintimille). De tie, aŭtobuso al Ste-Maxime haltas ĉe la restadejo. Per aviadilo: flughaveno de Nice; poste per trajno al St-Raphaël.

Per veturilo: ĉe la marbordo, RN 98 inter St-Aygulf kaj Les Issambres.

Programo: entenos krom la laborkunsidojn distrajn vesperon kaj balon, debaton, prelegojn kaj ekskursojn".

Kotizoj: (ĝis la 31a de Decembro 86) = Kongresan(in)o : 160F Geedzoj : 230 F

Junuloj kaj studentoj : 100F

Eksterlandanoj : senpage



**71a UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO, Pekino (Ĉinio)  
26 julio - 2 aŭgusto 1986**

\*\*\*\*\*

*Deko da federacianoj havos baldaŭ la ŝancon ĉeesti tiun historian kongreson (jam pli ol 2000 aliĝoj). Certe ili fotos, filmos kaj vidos multajn interesajn. La legantoj de SFS esperas legi en la venontaj numeroj raportetojn pri ilia vojaĝo. Anticipan dankon! Bonan vojaĝon al ili kaj agrablan restadon!*

Le monde espérantiste vit dans la perspective du 71<sup>e</sup> congrès universel d'espéranto qui aura lieu à Pékin du 26 juillet au 2 août.

Nous reparlerons bien sûr de cet événement mais, pour l'heure, revenons à la philatélie espérantiste chinoise.

Dans la chronique de mars 1983 (« La Philatélie Française » n° 345) je faisais une timide approche des pièces chinoises pouvant entrer dans notre collection thématique. Depuis, les choses ont beaucoup évolué.

Le 16 décembre 1982, le ministre de l'Éducation nationale de Chine rappela aux départements de toutes les provinces, municipalités, régions autonomes et grandes écoles de son autorité, que l'espéranto pouvait être enseigné et choisi comme deuxième langue étrangère à titre facultatif.



Le ton était donné et la Chine commence à s'éveiller à l'espéranto. Les groupes — y compris par spécialités professionnelles — et les publications espérantistes se répandent. « El Popola Ĉinio » de décembre 1985 fait état de plus de deux cent mille espérantistes en Chine. Compte tenu du fait que le phénomène est récent et qu'il s'agit, pour beaucoup d'étudiants et d'enseignants, les perspectives sont encourageantes.

Extrait de la rubrique de Jean Amouroux dans le numéro de Mai de "La Philatélie Française".  
Félicitations !



RTIMARKOJ

Tiu-ĉi numero de SFS ne estas simila al la aliaj. Kompreneble okupas sufiĉe vastan lokon la raporto pri "Vauvert", ĉar nia jara federacia kongreso estas privilegia etapo en la jaro. Dankon al tiuj, kiuj ebligis ĝian sukceson.

En tiu-ĉi numero troviĝas anoncoj, alvokoj, ktp. pli multaj ol kutime. Tiuj diversaj iniciatoj bezonas vian helpon. Ni ankaŭ dediĉis tutan paĝon al la junularaj aferoj; la estonteco ne dependas de ni sed de la gejunuloj: ni konsciiĝu pri tio kaj respondecigu ilin. Pro tiuj diversaj kialoj malaperas -tute provizore- la kutimaj rubrikoj: "Letero el Nimo", "Naturesciencaj historioj", "Tri la angla lingvo", eĉ la ŝatataj krucvortoj kaj ludoj (vi trovos ĉi-sube la solvojn de la n° 96). Spacomanĝo, bona signo de sano de nia bulteno, devigis nin denove prokrasti la aperigon de duonpaĝo pri gramatiko. Eble en nia venonta numero...

Estas konfirmite, ke nia aŭtuna laborkunsido okazos en Sète en Septembro. Gravas bone pre-  
-pari la Jubilean Jaron kaj sukcesigi nian kongreson en 87. Se vi intencas partopreni en nia laborkunsido, informu nian kasistinon, S-inon Négron 40 Chemin des Amandiers 34400 Lunel. La tagmanĝo kostos 50F.

Se vi intencas gvidi E°-kurson venontan jaron, t.e. en Septembro, informu nin pri la horaroj plej frue kiel eble; estus bone menciigi ĉiujn informojn en la sama bulteno (la septembra).

Anticipajn dankojn !

J. Hénin

\*\*\*\*\*

Solvoj de la n° 96:

Krucvortoj: Horizontale: 1. melankoliulo. 2. evidenta-map'. 3. Gitaro-Rabio. 4. at'-pekli-ikr  
5. List'-Ain-Lot. VI. Miaŭ-ĝni. VII. Miel' - Teo - kun. VIII. Apro- ok - doni. IX. Nea-Rar'  
us. X. Irlandanin' - XI. uidor' - Navaro. XII. LT-Bukolikoj.

Vertikale: 1. Megalomaniul' - 2. eviti-iperit'. 3. Lit'. smerald'. 4. Adaptilo-Aob. 5. Nere-onru.  
6. Knokaŭto - 7. ot-Li-Ekrano. 8. Laringo-Anal'. 9. Drivi. 10. Umbiliko- nak'. 11. Laiko-unu-  
ro. 12. Oportunistoj.

La miksitaĵ proverboj estis: 1: Kio estas lernita ne estas perdita  
2: Kio doloras pri tio ne ploras  
3. Kio bone aspektas, tion ĉiu elektas.

Pripensiĝaj proverboj !

Miksitaĵ silaboj "

\*\*\*\*\*

Miksitaĵoj: Se vi ankoraŭ ne pagis vian abonon, bonvolu fari rapide : ĝi estas nur 20 F..."

Certe kelkaj ne trovis la solvon, ĉar ili ne reabonis. Oni povas supozi, ke iu, kiu ne renovigis sian abonon en Junio, ne intencas reaboni. Ni tamen sendos cirkuleron al tiuj gesamideanoj, inter kiuj certe troviĝas forgesemuloj. Ni devas atenti niajn financojn kaj ne povas sendi SFS al la "forgesemuloj"... Male, alvenis nomoj de novaj abonantoj sed ofte nur en Aprilo, tro malfrue por la marta numero. Ni kalkulas ĉiufoje la kvanton, presigas kelkajn pliajn sed la plia kvanto ne estas tro granda. La paradokso estas, ke iuj ne reabonis kaj ricevis la unuan bultenon kaj aliaj abonis sed ne ricevis ĝin. Por eviti laŭeble tiajn problemojn, ni petas niajn legantojn reaboni antaŭ mez-marto (ĉiujare) kaj la grup-kasistojn sendi la ĉekojn sufiĉe frue, kun indiko pri la novaj abonantoj kaj la personoj, kiuj ne reabonas. Helpu nin "glatigi" la servon de SFS!

\*\*\*\*\*

L I B R O J: Somero estas privilegia sezono por legi. Ĉu vi legis la lastajn librojn de niaj federacianoj: "El la "Pensoj" de Blazio Paskalo", traduko de Valo kaj "Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon" de Jean Amouroux? Mendeblaj ĉe nia libro-servo.

Atingis nin dum la finpretiĝo de tiu numero de SFS la malĝojiga informo pri la forpaso, la 12an de Junio, de Sinjorino LLech-Walter, edzino de nia Honora Prezidanto.

Al nia amiko René LLech-Walter kaj lia familio, nia federacio esprimas sian

koran kondolencon.

\*\*\*\*\*

# LA ANGULO DE LA GEJUNULOJ

En Vauvert kelkaj gejunuloj sin renkontis; en Cassan ankaŭ, kaj ili promesis sin revidi en 87. Esperable baldaŭ konkretiĝos junulara sekcio en nia federacio. Je la nacia nivelo JEFO ŝajne reviviĝas. Gi eĉ disponas nun pri telefona respon-dilo al kiu vi povas fari demandojn, sugestojn, rimarkojn, kritikojn je iu ajn horo.



Allo, Jefe...

38.83.07.57

Post la renkontiĝo je Cieliro en Normandio, apud Monto Sankta Mikaelo, Jefe organi-zas en Grésillon apud Baugé (Maine et Loire), okaze de la internacia jaro de paco FRANC-GERMANAN JUNULARAN RENKONTIGON de la 25a ĝis la 31a de AŬGUSTO.

Temo de tiu renkontiĝo : malŝato inter popoloj.


Loĝado en 1, 2 aŭ 4-litaj ĉambroj. Se vi estas maksimume 25 jaraĝa, vi ricevos 50% da SUBVENCIO

por tiu parto de via vojaĝo, kiu okazas tra Francio kaj F.R. Germanio. Vi ricevos la subvencion en Grésillon, surbaze de viaj kostoj, maksimume duaklasa fervoja bileto. Facile via subvencio povos superi vian kotizon : do gajnu monon feriante !!!


Kotizo: ĝis 25j. 375F ĝis la 1a de Julio, 425F poste (pli ol 25j., aldoni 50F)

Antaŭpago: 125F al Jefe CCP La Source 31 709 94 Y

Petu aliĝilon de Isabelle Hénin Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue.



La Internacia Junulara Kongreso okazos en Neurim (Netanja)-Israelo de la 14a ĝis la 21a de AŬgusto (venontjare en Krakow -Pollando).



Alia interesa aranĝo estas la bicikla karavano: Rastatt(D), Strasbourg(F), La Chaux de Fonds (CH), entute 400 km en 12 tagoj, de la 1a ĝis la 13a de AŬgusto. Intereseĝa programo. Oni ankaŭ serĉas kuraĝulojn por daŭrigi tiun "biciklomigradon" ĝis Grésillon, 650 km en II tagoj kaj partopreni la franc-germanan junularan renkonton.

\*\*\*\*\*

Kelkaj aliaj interesaj aranĝoj antaŭviditaj por gejunuloj:

-31/8-7/9: Seminario en Strasburgo: Interkultura kompreniĝo kaj internacia kulturo (aliĝo nur 180F-inkluzivas loĝigon)

-27/12 - 3/1/87: Internacia Seminario en Köln, F.R. Germanio Internacia kulturo en praktiko.

\*\*\*\*\*

Sujet de bac (article paru dans "L'indépendant" du 5 Juin)  
"... La communication qui avait fait l'an dernier une entrée remarquée, n'a mérité cette année qu'une seule question, posée il est vrai dans tout l'Est: "peut-on légitimement instituer une langue universelle?"..." *Evidente!*

\*\*\*\*\*

**BAC 86**



## LA TERRE EST MALADE DE BABELITE AIGUË

Un seul remède...  
**L'ESPERANTO**

Cette cassette peut être commandée chez  
Mr Capus -15, Rue des Frères Platter 34000 Montpellier/

PREZO:25F (+sendkostoj 3F)  
HAVEBLAS ĈE S-RO CAPUS- 15, RUE  
DES FRERES PLATTER.34000 MONTPELLIER  
Prix:25F + frais d'envoi 3F

\*\*\*\*\*

Dankojn al nia sindonema samideano, kiu registris tiun kasedon dum la kongreso de Vauvert.  
Ni ankaŭ dankas Profesoron P. Janton, kiu permesis la registradon. La prelego daŭras 75 mn.

\*\*\*\*\*

Ĉar la prelego de P. Janton pri la tradukprojekto D.L.T. (dimanĉon matene en Vauvert)  
ne estis antaŭvidita, ĝi ne estis registrata. Tamen, li konsentis skribi por "SFS"  
ekzemplojn de frazoj en tiu "permaŝina traduksistema lingvaĵo" kaj ni aperigos ilin  
en la septembra numero

\*\*\*\*\*

Ni dankas trifoje:

- al la persono, kiu malavare donacis 200F por la federacia kaso  
(pro la kostoj de la kongreso de Vauvert)
- \* -al S-ro B., kiu donacis 100F al la grupo de Béziers por  
\* la organizado de la lingva staĝo en Cassan
- al la persono, kiu responde al la artikolo pri Srilanko  
donacis plurajn esperanto-librojn por transsendi.

\*\*\*\*\*

\*\*\*\*\*  
\* NOVA POSTKARTO \*  
\*\*\*\*\*

Une nouvelle carte postale

Okaze de la Jubileo de Esperanto  
nia federacio presigis tiun poŝt-  
karton, kie D-ro Zamenhof provas  
kuraci la teron pro babelito.

A l'occasion du Jubilé de l'esperanto  
notre fédération a fait imprimer  
cette carte postale, où le Docteur  
Zamenhof essaie de soigner la terre  
de babelite.

-----

Ĉiu karto pezas 6g. kaj kostas 1F.  
Aldoniĝas eventuale sendkostoj.

Une carte pèse 6g. et coûte 1F.  
S'ajoutent éventuellement les frais  
d'envoi.

-----

Mendu ĉe la federacia libro-servo  
Commandez au service de librairie  
de la fédération: J. Hénin  
Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue

\*\*\*\*\*

KASEDO DE PROFESORO P. JANTON  
Cassette en français du Professeur  
Janton : problèmes des langues  
internationales  
PRI LA PROBLEMOJ DE INTERNACIAJ  
LINGVOJ.



\* Louvain: 12-19/7  
Kilei: Instruistoj

Mesnil St Père  
staĝoj: 13-19/7: muziko  
14-20/8: ĵurnalismo  
21-27/8: FEI / Rastatt ĝis Svisujo  
1-15/8 Bicikla  
karavano por gejun.

Grésillon/Baugé  
29/6-20/7; 21/7-10/8  
10/8-23/8: Informatiko  
17/8-31/8; 26-31/8  
franc-germana por gejunuloj  
(renkonto)

Villingen: 29-31/8  
E° seminario

\* Challans 8-18/7  
Instruistoj (Freinet)

La Chaux-de-Fonds, Bodman  
5-6/7: kurso pri muziko 9-16/8  
Ferio-semajno  
14-26/7: por familioj

Rouillé: 26/7-3/8  
KELI (Kristana Ligo)

\* Bouresse: 6-12/7  
staĝo pri teatro 3-8/8, ktp

Boège (Habère Poché)  
30/8-6/9  
Ferio-semajno

La venonta numero de "Svizzera Stelo"  
aperos fine de Septembro.  
Sendu viajn artikolojn,  
antaŭ la 14a de Sept.  
aŭtuna laborkunsido) al  
Rte de Montcayroux 485  
00 La Canourgue  
66 32 86 36.  
Tel

Ardèche 2-12/7  
Piedmigrado

Trescloux 30/6-6/7  
Piedmigrado

Pau: 22-29/7  
Kultura+Turisma semajno

Gattières  
1-15/7  
staĝo pri akvarelo

Valo Ordesa  
26/7-1/8  
Antaŭkongreso de SAT

Sant Cugat del Vallès  
2-9/8: Kongreso de SAT



Al ĉiuj niaj legantoj kaj iliaj familioj  
ni deziras agrablajn feriojn.